

# La urdua: lingvo kaj kulturo

اُردُو


उर्दू

Giri RAO

[agiridhar.rao@gmail.com](mailto:agiridhar.rao@gmail.com)

Bengaluro, Barato

La urdua:  
Lingvo de Bolivud-filmoj!  
Jen afiŝo de  
*Mughal-e-Azam* (La granda  
Mogolo) (1960)



<https://en.wikipedia.org/w/index.php?curid=16657937>

La urdua: Lingvo de la  
Mogola imperio (1526-1857  
KE)

Oni konis la lingvon per pluraj  
nomoj: *Hindavi, Dehlavi,*  
*Lahori, Rekhtaa, Laŝkarii.....*



Justus Perthes, Gotha.

4 *milionoj* kvadrat-kilometroj!

Ni vidos baldaŭ aliajn  
ciferojn same kapskuigajn!

Nomo de la tjurk-lingvara  
vorto *Ordu* = Armeo

Sed la urdua estas ankaŭ  
lingvo de poetoj!

Jen la delhia Ghalib [gaalib]  
(1797-1869) -- poeto kiu  
akre kritikis la morojn de la  
epoko.





Kaj la pakistana Faiz  
Ahmad FAIZ [fejz]  
(1911-1984) -- kiu verkis  
poezion fajre politikan...  
sed ne nur!

## “Via memoro” de Faiz

Nokte venis en la koron via  
memoro

raat yuu.N dil me.n terii khoii huii  
yaad aaii

Kiel en sovaĝejon kvieta  
printempo

jaise viiraane me.n chupake se  
bahaar aa jaae

Kiel en dezerton lanta vento

jaise saharao.n me.n haule se  
chale baad-e-nasiim

Kiel al malsanul' ial paco.

jaise biimaar ko bevajah karaar  
aa jaae.



De BpldxbCrop de Titodutta - Propra verko, CC BY-SA 3.0,  
<https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=67270537>

Kaj la hajderabada Jameela  
NISHAT [ĝamiila niŝaat]  
(1955-)

Verkisto inisma en la  
dakhana lingvo. (Pri tiu  
lingvo, pli poste!)



NaserBanaqeeb - Propra verko, CC BY-SA 3.0,  
<https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=41041782>

## La urdua: cifervangaro

- 69 milionoj da denaskaj parolantoj + 102 milionoj kiuj parolas la urduan kiel sian duan lingvon = 171 milionoj da parolantoj
- Oficiala lingvo de Pakistano (kune kun la angla): 16 milionoj da denaskaj parolantoj tie
- Unu el la 22 oficialaj lingvoj de Barato: 51 milionoj da denaskaj parolantoj

# La urdua-hindia gamo

- Strukturoj de la hindia kaj urdua: EGE similaj!
- Stratlingve, ne distingeblaj! Uzataj de ĉiuj: islamanoj, sikhoj, hinduoj, kristanoj
- Sed lingvotavole: Ju pli alte des pli malsame
- La urdua vortostoko el la persa kaj araba; la hindia el la sanskrita
- Gandhi nomis la stratlingvon, “la hindustana”
- Sed tiu nomo tute ne temas pri la religio, la hinduismo!

En la “hindia”:

Akvo, ĉiutage, mateno,  
mondo, novaĵo, teo, legomo,  
vespero -- ĉiuj el tiuj estas  
urduaj vortoj -- persdevenaj  
aŭ arabdevenaj.



Javed AKHTAR [ĝaaved akhtar]:

“Ĝis tiam kiam vi komprenas la lingvon, ĝi estas la hindia. Se vi ne plu komprenas ĝin, ĝi iĝas la urdua!”

-- Publika intelektulo pri la lingvo kaj la vivo



[https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/e6/Javed\\_Akhtar\\_2010.j  
pg](https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/e6/Javed_Akhtar_2010.jpg)

Nesurprize en lingvo  
parolata en tiom vasta  
teritorio, ekzistas multaj  
lokaj variaĵoj: ekz., la  
dakhana, parolata en la  
hajderabada regiono

# La dakhana: interesajoj

- Necerteco-markilo “kete”
- *vo aajaa* = Li venis; *vo aajaa kete* = Oni diras, ke li venis
- La preciziga kaj emfaziga sufikso “-iĉ”
- *aaĝ* = hodiaŭ; *aaĝ-iĉ* = nur hodiaŭ, aŭ ĝuste hodiaŭ
- *haŭlaa* (utila loka vorto!) = stultulo
- *vo haŭlaa aaĝ-iĉ aajaa kete!* = Oni diras, ke ĝuste hodiaŭ venis tiu stultulo!

Sed kiel lingvo de la reĝoj,  
la urdua iĝis ankaŭ lingvo  
de ĝentileco!

## VI, Vi, kaj vi

- aap ( आप ) = VI (kun respekto al maljunuloj, pliaĝuloj, altranguloj, nekonatuloj)
- tum ( तुम ) = Vi (al samranguloj, amikoj)
- tuu ( तू ) = vi (al malaltranguloj, eĉ malrespekte, sed ankaŭ al intimuloj kaj inter geamantoj!)

Kiel petas la poeto:

## “Gentileco”

Ja debatu, kara,  
sed g̃entile: /  
*Estimata!* ne ĩgu  
*Sinjoro!* / Tio ne ĩgu  
*Vi!* / Kaj tiu neniel  
*Hej!*

bahas karo shekh,  
lekin adab ke saath  
*/ hazarat se aap,*  
*aap se tum, tum se*  
*tuu naa ho!*

Kune kun tiu ĝentileco, venis  
amaso da kulturaĵoj: vestaĵo,  
muziko, arkitekturo!

Bonodoris tra la lando kune  
kun la urdua lingvo ankaŭ la  
kuirarto: jen la rizplado, birjano!





De Shyamveer.singh1982 - Propra verko, CC BY-SA 4.0,  
<https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=40878643>

# La urdua hodiaŭ: temo sombra kaj sobriga

- Malpli da prestiĝo
- Ofte nomata “la lingvo de la islamanoj”
- Malsategita finance kaj eduke, kaj ne nur de hindu-dekstrisma registaro
- Ostaĝo al rilatoj inter hinduoj kaj islamanoj

Lamentas poeto nekonata:

# “Kvazaŭ la urdua”

Nek povas mi nomi iun ajn  
mia

Nek povas iu nomi min sia

Ankaŭ mi ĉi-lande vivas

Kvazaŭ mi estus la urdua.

naa mai.n kisii kaa, naa  
koiĉi meraa

mai.n bhii ĵii rahaa huu.N  
is desh me.n

urduu kii tarah.

Tial la uzo de la urdua estas ago ne nur lingva kaj kultura, sed ankaŭ politika.

Malgraŭ la manko de subteno, ĉu la urdua floras? Pro ĝia uzo en filmoj? En la poezio? Surstrate?

Tute ne!

Kun ŝrumpantaj nombroj de  
urdua-legantoj

La poeto rapide iĝas “Poeto sen  
popolo”!

*Neniu* lingvo barata floras!

Ĉiuj raportas krizon!

# La vojo antaŭen?

- Trakti la literaturon serioze en la eduksistemo
- Komenci fari tion en la lernejo
- Subteni gepatralingvan edukadon
- Subteni lokajn iniciatojn
- Konstrui solidarecon inter lingvoj (Lingvaj Festivaloj!)

# Sed kial?

- La literaturo igas nin pensi pri aliaj vivoj: kunsentado
- La demokratio *bezonas* civitanojn kiuj kapablas kritiki
- Civitanojn kiuj kapablas kune agi
- Ĉar la minacoj estas tutplanedaj!
- “Alia mondo eblas!”

Longa vojo; tasko transgeneracia!

Sed nur tiel, kiel diras Faiz, ni vidas, ke



## “Nur nokto ĝi estas” de Faiz

Ne senesperas la koro

dil na-umiid to nahii.n

Nur nesukcesa ĝi estas

naakaam hii to hai

Longas la nokto de  
l'tristo

lambii hai Gam kii  
shaam

Sed nur nokto ĝi estas.

magar shaam hii to hai.

# La urdua: lingvo kaj kulturo

اُردُو

उर्दू

Giri RAO

[agiridhar.rao@gmail.com](mailto:agiridhar.rao@gmail.com)

Bengaluro, Barato